

EABNetNews

June 2008

Editor; Eric Walker

Any contributions or comments please send to ericwalker@gn.apc.org

Treasures from the Internet.

A friend of mine was surfing the Internet and by chance found a Russian feature film which had Esperanto subtitles. He put this on a DVD for me and very enjoyable it was. The title is 'La Baleta Soloistino' and is a rather maukish love affair set in the world of Russian Ballet. It is an old film (1947) with some famous Russian dancers taking part.

In addition to this there are many old Soviet classics of Eisenstein, Vertov etc as well as science fiction films and comedies such as 'The Government Inspector' by Gogol.

To inspect these treasures visit

<http://kinejo.blogspot.com/2007/03/02/saluton/>

If anyone wants to transfer any of the films to DVD I am told that you need special software and it is a lengthy business and can take up to 24 hours to download on to a DVD! But I know nothing about this procedure. If anyone would like to contribute an article it would be gratefully received by me. Incidentally if anyone knows of other hidden treasures on the Internet then please let me know so that I can tell others.

A message from Bert Schumann.

- Kiam hungaroj montras la vojon
- EEU subtenata de la Komisiono
- En septembro aĉetu Gazeta Wyborcza

Pri tiuj temoj aperis la 8a numero

de la informletero "Europa Voĉo" de EDE:

http://e-d-e.org/IMG/pdf/EDE_vocxo_eo_mar_2008-7.pdf

Ĉiuj aperintaj numeroj:

<http://e-d-e.org/spip.php?article206>

Por senkoste aboni ĝin, tajpu vian retadreson tie:
<http://e-d-e.org/spip.php?rubrique42>

Por pledi pri Esperanto, nia movado agas kiel politika partio
"EDE" = "Europo Demokratio Esperanto" en Europaj Balotoj 2009.

Ĝia hejmpaĝo jam estas 18-lingva:
<http://e-d-e.org> au <http://demokratio.eu>
Helpu traduki al aliaj lingvoj au kontroli faritajn tradukojn.

Ni serĉas kontaktpersonojn kaj subtenantojn en ĉiuj landoj
de Europo, precipe en EU-landoj. Vidu la rubrikon "Federacio":
<http://e-d-e.org/spip.php?rubrique12>

Bv. respondi nur al <bert.schumann@gmail.com>, ne al la tuta grupo!
Berto

The Polish radio in Esperanto, to celebrate their 500th Esperanto
"Podcast" have re-transmitted their 1000th short-wave radio broadcast of
the 1st January 1962. this Thursday 22nd May
In it you clearly hear contributions from Professor Dr. Ivo LaPenna, then
General Secretary of UEA, William Auld and Teo Jung, and well
known officials at that time from the Polish Radio whose names I hesitate
to try to spell. A Podcast well worth saving, and if you haven't got their
address it is:-
<http://www.polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml>.

Don't forget to write in to Barbara Petrzak and her "Esperanto Skipo", at
Barbarinella@gmail.com to give your opinion of the podcast - their
future really does rely on contributions from their listeners and there seems
to be almost no-one who writes from Britain these days, though I'm sure
that plenty do listen.

Intertempe, amike salutas Ian Mac Dowall Wallasey (GB)

Holidays -- Ferioj -- Holidays -- Ferioj

Internacia Amikeca Renkontiĝo -The Friars, Aylesford Kent.

This long weekend break (Friday 26 to Monday 29 September 2008) takes place in the pleasant and calm surroundings of the monastery which is now a modern conference centre. This year the theme is "Famous people". Strongly recommended by your editor ! More details from Anica page, 7 Hampton, Great Holm, Milton Keynes, MK8 9EP. Tel" 01908 564004

From: bert.schumann@gmail.com
Subject: [esper-brit] bv. peti informon pri someraj E-kursoj en franca kastelo

Por ricevi ĉiujare informon pri la someraj kursoj en Grezijono, bonvolu [prefere] skribi al mi: bert.schumann@gmail.com
au klaki al: <http://groups.google.com/group/gresillon-kursoj/subscribe>
au sendi ajnan mesaĝon al: gresillon-kursoj-subscribe@googlegroups.com

Vizitu la Esperanto-kastelon Grezijono (Gresillon) en Francujo por ĝui agrablan tempon, por lerni E-on kaj aktivi dum tuta semajno inter la 5-a de julio kaj la 16-a de aŭgusto 2008.
++ kantado kaj ekologia semajno en junio 2008 ++

Konsultu la agendon en: <http://gresillon.org/accueil.htm>

Eblas elekti unu au plurajn el la 5 someraj semajnoj (sabate ĝis sabate). Ĉiu stagho-semajno havas Esperanto-kurson en 3 gradoj kun instruistoj el 7 diversaj landoj kaj aldonan aktivajon: koruso, masaĝo, teatro, pentrado, dancado, Go-ludo.

Grezijono estas kastelo kun granda parko kaj lageto. Eblas dormi en lito en la kastelo au en via tendo sur nia kampadejo. Eblas promeni en la kastela parko, tra arbaro kaj herbejo. Tri manĝoj disponeblas, kafejo funkcias inter la kursoj.

Por peti ke oni sendu al vi paperan version, skribu al: kastelo@gresillon.org
au al:
Maison Culturelle, Chateau de Gresillon

FR-49150 BAUGE, Francio
telefono/respondilo: (+33) 241 89 10 34
retejo: <http://gresillon.org>

Estimataj,
mi volas oficiale bonvenigi Vin al 42-a Internacia Esperanto-Feriado.
Mi pardonpetas, ke mi faras tion sufiche malfrue, tamen mi esperas, ke
tiuj, kiuj volos alveni al Szczawno Zdroj sukcesos tion fari. Alighilon
kaj enkondukajn informojn Vi trovos sur nia retpagho.
Vi ankau povas tie trovi rememorojn de pasintaj feriadoj.
Adreso sube
Kore mi salutas Vin.

Teresa

<http://vroclavo.republika.pl/>

Mi translokiĝas al apartamento proksima al Barcelono. Ĉar ĝi estas sufiĉe
granda, mi planas lui unu ĉambron kaj mi tre
ŝatus ke ĝi estus okupata de esperantist(in)o. Temas pri ĉambro kiu
inkluzivas malgrandan kuirejon kaj apartan necesejon kun duŝejo. La
apartamento situas en la rando de urbeto Igualada, en tre paca kvartalo
kaj je 5 minutoj piede de la ĉefa stacidomo. Trajnoj al Barcelono estas
tre oftaj. La komuna bontrovo ni povas kunuzi ankaŭ bibliotekon kaj
manĝosalonon kun balkono. Entute la loĝejo ricevas multe da sunlumo.
La urbocentro troveblas post 15 minuta promeno. En la ĉirkaŭo viziteblas
mezepoka kastelo kaj surmona ermitejo.

La ĉambron oni povas lupreni por monatoj junio, julio aŭ aŭgusto. La
prezo estas 125 € / monate (ĝi inkluzivas ĉiujn elspezojn). Laŭ mia
disponebla tempo mi volonte helpas ĉiĉerone kaj, en sia kazo, en la
lernado/praktikado de Esperanto, kataluna aŭ hispana. Pliaj informoj
skribante al: k.berga@gmail.com

Kiun ajn diskonigon de tiu ĉi cirkulero mi tre dankos.
brakume,
Karles
<http://www.ipernity.com/home/berga>

Esperanto provides a link not only to enjoy pleasures but also to link and give help where possible.

Pliaj raportoj pri tertremo en Chinio.

Bv. rekte alklaku:

http://i.cn.yahoo.com/tertremo/blog/p_1/

I read an article entitled **Esperanto project success at Marown School** at <http://www.iomtoday.co.im/west-news/Esperanto-project-success-at-Marown.4076954.jp> and I thought it may interest you.

Hilary Chapman

From: david.r.curtis@btopenworld.com

Subject: Kontribuo

Date: 8 May 2008 08:19:54 BST

To: ericwalker@gn.apc.org

Reply-To: david.r.curtis@btopenworld.com

Saluton, Eric!

Mi ne havas la retadreson de Albert Lindsay, sed eble li ŝatus legi la jenon en via novaĵletero?

Mia Esperanto-instruisto kiam mi komencis lerni Esperanton en 1974, estis s-ro Albert Lindsay, kiu en 1946 estis mekanista soldato en paraŝutista regimento de la brita armeo en Hajfa. Kiel mekanisto li portis nigran ĉapelon, dum paraŝutistoj portis ruĝan. La sekreta juda armeo malamamis paraŝutistojn, do estis danĝere marŝi en la urbegon portante ruĝan ĉapelon. Iun tagon paraŝutista kapitano petis al Albert pruntepreni por li nigran ĉapelon por ke la kapitano marŝu sekure tra la urbo. Kiam Albert prunteprenis ĝin, la kapitano kaj li kune iris en la urbon. Survoje, la kapitano diris ke li scias ke Albert scipovas plurajn fremdlingvojn, kaj tial Albert atendis helpi lin kompreni iun el ili. Kiam la kapitano alvenis ĉe sia celstacio kaj frapis sur pordon, iu bonvenigis lin per stranga lingvo.

Albert komentis ke li ne povas helpi la kapitanon, ĉar li mem ne komprenis. La kapitano respondis ke ne gravas, ĉar ili alvenis ĉe Esperanto-klubo, kaj li invitis al Albert eniri kun li, kaj lerni siajn unuajn vortojn de la internacia lingvo. Tiel Albert entuziasmiĝis pri Esperanto kaj instruis ĝin al multaj britoj dum la postaj jaroj. Mia bedauro estas ke mi estis tiutempe kaj samloke paraŝutista soldato, sed mi ne ekkonis Alberton ĝis mi komencis lerni de li per koresponda kurso; do, mi malŝparis dudek-ok jarojn !

Amike, David.

(Noto de red. Mi mem, dum la sama tempo pri kio David skribis estis ankaŭ en Haifa de tempo al tempo! Mi laboris en brita armea kolegio en Sarafand apud Tel Aviv kaj ĝi havis filion en Haifa. Tamen tiam bedaurinde mi ne sciis io ajn pri Esperanto!)
